

Kulturaj Kajeroj

É MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

1970 3 - 4

KULTURAJ KAJEROJ

1970 MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Gresillon

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Grekaj freskoj en Paestum — M. Conil-Lacoste

Ekologio

Batalo por savi la teron — P. Potin

Akvo gustumisto — trad. O. Guillot

Fabrikado de alumetoj — B. Cheverry

Rakontoj

La Medikago — J. Renard

Nur songîs la hundo — trad. J. Lenel

Por via distro

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Antaŭ 18 jaroj la kastelo, Gresillon malfermis siajn pordojn la unuan fojon. Gesroj Micard, kiuj jam de pluraj monatoj zorgis pri la organizado de tiu unua « sezono » en tre malfacilaj cirkonstancoj, konsciis, ke baldaŭ venos la pravigo aŭ la malpravigo de ilia granda laboro. La nuna situacio de la Kulturdomo montras, ke ili pravis. Kaj ĉijare, la 19-an fojon, la pordoj de Esperantujo malfermiĝas por akcepti gesamideanojn el la tuta mondo. Same kiel la antaŭajn jarojn la sukceso estos kontentiga en Aŭgusto, mezkontentiga en Julio. Fakte restas nur malmulte da liberaj lokoj por la kvara periodo, ankoraŭ pluraj por la tri unuaj. Tamen la programoj de tiuj lastaj periodoj estas tiel interesaj kiel tiu de la kvara. Ni do konsilas al la gesamideanoj, kiuj ankoraŭ hezitas, viziti Gresillon en Julio.

RAPIDU

se vi deziras trovi logejon en Grésillon

Skribu tuj al : E.K.D., Grésillon, 49-BAUGÉ, Francujo
aŭ telefonu al : Baugé 34

Esperanto tra la Mondo

La kongreso en Vieno :

— Por la teatraj prezentadoj, la kongresa komitato invitis la Silezian Teatron el Opava (Ĉeĥoslovakio), kiu ludos lirikan versdramon « Manon Lescaut » kaj la Bulgaran Esperanto-teatron, kiu prezentos folkloran komedion « La virina regno ».

— La muzikamantoj ĝuos koncerton de la ĵus establita Internacia Orkestro, en kiu eniros esperantistoj el diversaj landoj.

Aliaj renkontoj tra Eŭropo :

— Internaciaj feriaj esp. kursoj de Helsingör (Danlando) 19-26 de Julio.

— Aŭtunaj feriaj esp. kursoj en altlernejo ĉe Aarhus, 18-24 de oktobro. Por la du renkontoj, skribu al : L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Aabyhoj, Danlando.

— De la 1-a de julio ĝis 31-a de aŭgusto : ferioj apud maro en Istrio, en la internacia esperanta ferio centro de Volparija (Jugoslavio). Skribu al : I.E.F.C. de esperanto-societo, Ljubljana, Pf. 401.

— Restadoj ankaŭ ĉe adriatika maro en la somervilaĝo de Primoŝten, Jugoslavio.

— En Svisujo : Eŭropa feriosemajno, 23-29a de aŭgusto, en Gwatt, apud la lago Thun. Skribu al Sro E. Glätti, Laustr. 17, CH 5200 Brugg, Svislando.

— Esperanto semajno, 5-11 de julio, en Finnlando, apud la lago Paijänne, norde de la urbo Lahti. Adreso : Esperanto-klubo, Vääksy, Finnlando.

Kongreso sur ŝipo :

— La itala kongreso de esperanto okazos de la 19a ĝis la 26a de septembro, sur granda ŝipo « Caribia », kiu krozados tra la Mediteraneo kun haltoj (post foriro el Genovo), en Cannes, Barcelone, Palma de Majorko, Bizerte, Palermo, Capri, Genovo.

Oni povas enŝipiĝi en Cannes aŭ Barcelono.

Adreso : Torina esperanto-grupo, Itala Kongreso, Casella postale n° 198, Torino 1-10121, Italujo.

Gejunuloj :

— Ĉu vi deziras helpi instrui esperanton en labortendaroj ? Tuj rilatu kun F-ino Jeanne-Marie Liouville, 6, rue L.-Vaudoyer, Paris 7e, Francujo.

Francaj esperantistoj mondcivitanaj :

— Se vi jam posedas la karton de mondcivitanoj aŭ se vi deziras aliĝi al tiu movado, rilatu kun G-roj Volpelière, 10, rue de la Servie, 30 Nîmes. Ili kreis esperanto-centron de la mondcivitanoj.

En la Akademio de Esperanto :

— Ĉi havas kvar novajn membrojn : Dr I. Chiussi, Dr G. Mattos, Dr V. Sadler, Mag. J. Wells.

Eldonaĵoj :

— La dana libro « ABZ de Amo », verkita de du psikologoj kaj jam eldonita en 13 lingvoj aperos ĉi-jare ankaŭ en la internacia lingvo Esperanto.

— La registaro de Ĉina Popola Respubliko ĝis nun aperigis el la verkoj de Maŭ Zedong 68 eldonojn en la internacia lingvo Esperanto.

Televida kurso : la Nederlanda instru-televido (Teleac), en kunlaboro kun la esperanto-asocio, preparas kurson por la periodo 1971-72. Estas dezirinde, ke similaj televidaj kursoj okazu samtempe en aliaj landoj.

En la fakoj : Internacia Unuiĝo de Filologoj Esperantistaj (I.U.F.E.) havas nun 133 membrojn, kaj Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj 2.701.

En lernejoj : En la Domo de Sociaj Organizaĵoj, en Maribor (Jugoslavio), okazis (27-29 de marto) la 3-a kunordiga konferenco por enkonduko de esperanto en la lernejojn, kiun partoprenis 42 reprezentantoj el Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio, Jugoslavio.

— Internacia Instruista Konferenco okazos, ankaŭ en Maribor, de la 28-a ĝis la 31-a de Julio.

Nur 5 guldenojn kostos al vi la abono al la junulara gazeto « KONTAKTO » se vi estas sub la aĝo de 26 jaroj.

El Sovet-Unio : En februaro okazis en Moskvo nacia konferenco de la esperanto-komisionoj funkciantaj sine de la sovetaj respublikaj asocioj por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando. Eble vojo al reorganizo de asocioj de esperantistoj ?

El Okcidenta Germanujo : Okaze de balotelektoj de 1969, la tri ĉefaj germanaj politikaj partioj reagis pozitive al demando de germana esperanto-asocio pri esperanto.

Grekaj Freskoj en Paestum

Rimarkindaj arkeologiaj malkovroj en tiuj lastaj jaroj

En siaj verkoj Pline la Praŭlo priskribis la belegajn helenajn freskojn, kiuj ornamis propileojn kaj ĉefajn domojn en la metropolo kaj en ĝiaj kolonioj. Kelkaj anekdotoj parolis pri Polignote, Zeuxis, Euphranor : grekaj pentristoj (tiu ĉi lasta ankaŭ statuisto), kiuj vivis en la 5-a, 4-a jarcentoj antaŭ Kristo. Sed pri tiuj majstraj pentraĵoj oni, ĝis nun, nenion retrovis krom kelkaj polikromiaj spuroj sur tavoloj de terakoto aŭ sur ŝmiraj disrompitaĵoj. Kalko-fornoj glutis la freskojn ; Roma disrabado almetiĝis al aliaj militistaj vandalismoj kaj al la malfirmeco de tiuj fresko-tavoloj ; en Ateno, la propileoj de Akropolo estis la plej famaj ; konstruitaj de Mnesiklès inter 437 kaj 435 a.K., ili restis sendifektaj ĝis la XIV-a jarcento. Je tiu periodo la Atenaj Dukoj stumpigis Akropolon por konstrui fortresan kastelon. Poste, Turkoj ĝin kovris per kupolo por igi ĝin armilejo kaj pulvejo.

Ĉar tiuj ĉefverkoj malaperis, restis al ni nur ilin imagi dank'al priskriboj de Pline, dank'al malkovroj de pentritaj vazoj, kaj pli malbone pere de iaj transponoj fare de romaj penikoj multe pli mallertaj.

Jam de kelkaj jaroj ni konatiĝis kun Paestum kaj ĝiaj elegantaj temploj, inter kiuj tiu de Neptuno, tute simila al Partenon, plej multe ĉarmas niajn okulojn.

Paestum estas la antikva Poseidonia, fondita en la 7-a jarcento antaŭ nia erao. Ĝi kuŝis ĉe Salerne-golfo, 80 km sude de la nuna Napoli ; ĝi estis unu el la plej gravaj kolonioj de la Granda Grekujo ; institucioj, lingvo, kultoj, arto... ĉio estis greka... ĝis la 5-a jarcento a.K. kiam la praloĝantoj, la Lukanoj, malsupreniris el siaj montoj, konkeris Poseidono-n kaj forpelis la Atenoreprezentantojn. Sed Paestum kaŝis mirindaĵojn, tute ne konatajn ĝis 1968.

En junio 1968, profesoro Mario Napoli, superintendanto pri antikvaĵoj en la provinco Salerne-Paestum gvidis prifosojn : zorge kaj metode oni laboris je 1500 metroj sude de la antikvaj muroj, kiuj ĉirkaŭis la antikvan grekan urbon. Oni malkovris nekropolon kaj malfermis tombon ; internen enŝoviĝante sunradio rivelis pentraĵojn mirinde freŝajn : sur la du laŭlongaj vandoj, kiom loga estas tiu funebra bankedo-sceno ruĝa-nigra-flavakaj blua. Tie dek kunmanĝantoj, barbaj, laŭrkronitaj, kuŝantaj kaj apogantaj surkubute, kun la torso nuda, por unu momento sin dediĉas al muziko, aŭ reciproke amindumas, aŭ ludas per « Kottabos » : antikva ludo konsistanta en akrobata transverŝado de vin-pokaloj, sur seninterrompa lito signita de unu nura lazura linio. Ĉe la ekstremaĵoj la slaboj estas pli mallarĝaj : sur unu staras flutisto, kiu antaŭiras la akompanantaron de la mortinto ; sur la alia vinisto proponas vinon. La desegno, jam lerta, estas pura je la sintenadoj kaj la koloroj, tamen apenaŭ modulitaj. Tiuj freskoj montras la unuajn paŝojn de la pentro-arto kaj ankaŭ konfirmas la helenajn ritojn pri vivo kaj morto.

Pli neatendita estas la motivo, kiu ornamas la internan facon de la fermo-plato. Efebo ŝvebas inter tero kaj



ĉielo, senfine plonĝante el supro de gracila plonĝotabulo, inter stilizitaj arboj, kun monteto ĉe la horizonto.

Kelkaj precizaj detaloj permesas al P-ro M. Napoli certigi, ke tiu nekropolo datumas proksimume de la 480-a jaro a.K. : reprezentado de la okulo, grafa interpretado de la muskolaroj kaj precipe la formo de la vazo interne trovita.

La specialistoj tute same konsentas : en la tombo de la « Plonĝanto », stile, kulture kaj eĉ politike, la freskoj estas grekaj kaj sendube ankaŭ la pentristo mem. Sinjoro François Villard, franca specialisto pri greka arto skribis : « ĝis la ĵusa malkovro en Paestum de tombo pentrita proksimume en la jaro 480 a.K. ni konis nenian originalan pentraĵon grekan eĉ de « minora pentristo ».

Tamen tiu malkovro multe surprizis la specialistojn : efektive nenia tradicio pri funebra pentraĵo ekzistas en la antikva Grekujo. Nur post la 4-a jarcento a.K. kaj en la periferio oni trovas pentritajn tombojn. Ne plu temas pri pura greka arto ; la stilo estas pli geometria ; ĉe la Etruskoj ĝi estas esotera kaj rita ; ĉe la Lukanoj la funebra dekoracio estas tradicia, kun propraj temoj : multaj luktoj, rajdantaj militistoj, flugilhava Venkanto sur sia ĉaro. Konsekvence, al tiu « Plonĝanto » oni donis du interpretojn tute malsimilajn :

Unue : tiu tombo povas esti tiu de eminenta Lukano, ne greka, loĝanta en Paestum sub la greka hegemonio ; li ricevis — de greka mano — funebron laŭ lukana tradicio.

Due : la « Plonĝanto » povas elvoki la pitagoran signifon de la « rita plonĝo » ; tiukaze la mortinto estis greka ano de pitagora loĝio en Paestum.

Sed por la italaj arkeologoj ne estis la lasta surprizo.

La 12-an de julio 1969 Luigi Franco plugis terpecon, cele al rikoltado de artiŝokoj ; ĉar lia soko fosis pli profunden ol tiu de la antaŭaj jaroj ĝi renkontis tombon. P-ro M. Napoli ĉi tie gvidis novajn prifosojn en tiu regiono situanta je 300 metroj norde de la muroj. Tiu ĉi tombo estis malplena kaj nuda. Sed dum la tri sekvantaj monatoj laŭ surfaco 100 m. × 70 m. oni malkovris 83 ĉerkojn ; 50 estis pentritaj sed nur 30 el ili montris bonstatajn freskojn. Escepte 5, ili enhavis vazojn, kiuj permesis fiksi daton : 340 jaroj a.K. — La fermo-platoj ne estis pentritaj ; tamen oni disponis proksimume je 120-140 pentritaj vandoj el la plej malproksima antikveco. Ilia stilo, kvankam ne pure greka, tamen forte entenas helenismon nuancitan per loka indiĝena akcento, speciale plaĉ-aspekta.

La lukanaj pentristoj unue inspiriĝis de la grekaj vazoj. Sed baldaŭ aperas propra farmaniero : originala kolizio ĉe la koloroj kaj novaj temoj : paŝtistaj, militistaj kaj mitologiaj.

El greka mitologio : jen en la supra parto de vando, sub ina formo, KARONO, la boatgvidanto sur Stikso ; li akceptas, en sia infera barko, la mortintinon ; malsupre iu kondukas bovidon oferbuĉotan honore al la mortintino ; matrono sekvas la beston kun pleto da oferaĵoj sur la kapo ; malgranda servistino portas granatojn, kiuj simbolas reviviĝon kaj estontan vivon ; plorantino postsekvas. Ili estas tipaj kamparaninoj tiaj, kiajn oni renkontas nuntempe.


Kampara temo : jen ĉaro de lukana kamparano, kiu preterpasas arbojn (simila naturalista detalo estas malofta en la greka arto de la 4-a jarcento a.K.). Jen kurado de kvadrigo. Jen Hermes jungita ĉe ĉaro de infano. Jen nur arabesko laŭ diagonalo.

Sur ĉiu slabo la ĉefa motivo estas ĉirkaŭata de marĝena dekoracio, sendube farita de helpanto : girlandoj de floroj, ovoj, granatoj. Unu slabo montras en sia mezo nur plektaĵon el la tiamaj famaj rozoj de Paestum.

Oni supozas, ke la vandoj — proksimume longaj je 1 m. — 1 m. 50 — 2 m. kaj larĝaj je 0 m. 90 — 1 m. estis antaŭe preparitaj : oni ilin ŝmiris per speciala freŝa ŝmiraĵo kaj verŝajne dekoraciataj je la lasta momento. Sur kelkaj vandoj ankoraŭ vidiĝas spuroj lasitaj de la ŝnuroj, kiuj servis por ilin instali.

Krom kelkaj malmultaj ostaroj, kion oni trovis en tiuj tomboj ? Juvelojn, vazojn ; nur unu el tiuj vazoj estas subskribita — sed de la fama PYTHON, kiu, kun ASTEAS dekoraciis la amforojn, kun plektitaj ansoj, kiuj famigis la fabrikon de Paestum.

Ŝajnas, ke tiuj freskoj estas rezultoj de sinsekvaj desegnoj. Tion montras ekzamenoj faritaj helpe de tanĝanta lumo : oni trovas vicojn de rajdantoj, luktojn de pugno-batalantoj aŭ hoplitoj, scenojn de cervo-ĉasoj, virbovojn, grifojn, fabelajn birdojn.



La « Plonĝanto » kaj la aliaj pentritaj slaboj estis transportitaj en la proksiman muzeon, kie ili sekiĝas.

La arkeologoj de Paestum tie renkontis ŝancon. De nun multaj jaroj estas necesaj por science ekzameni tiujn malkovrojn.

Kelkaj arkeologoj pasas tutan vivon por rekrei 20 metrojn da antikva muro aŭ por ekzameni disigitajn disrompaĵojn. Oni devas ilin kredi, kiam ili certigas ke tiuj 140 pentraĵoj konstituas kun la « Plonĝanto » gravan revelacion pri la greka pentrado.

el Courrier
de l'UNESCO
(M. Conil Lacoste)

BATALO por savi la TERON kontraŭ la HOMOJ

EKOLOGIO kaj prizorgo de la ĈIRKAŬAĴO

En antaŭa artikolo ni konsideris la rolon de la Biosfero kaj la nepran neceson de ĝia sendifekteco.

Ĉirkaŭ la jaro 1950 Commoner komencis reliefigi la konsekvencojn de la radioaktivaj defalaĵoj. Oni prave timas la flankdanĝerojn de la atomaj eksperimentoj. Eĉ en la dentoj de Usonaj beboj oni trovis stroncion.

En 1963 Commoner pritraktis plej diversajn problemojn, inter ili la kolizion de la teknologio kun la tuta Ĉirkaŭaĵo. Li tiutempe zorgis pri la « morto » de la lago ERIE. Tio kondukis lin al kompletaj studoj koncerne al : kloakoj, fekundigaĵoj, purigaĵoj, kemiaj insekt-mortigiloj, polucio fare de la aŭtomobiloj, danĝeroj de la atomaj industriaj instalaĵoj, k.t.p. En 1966 Commoner klopodis unuigi la fizikistojn kun la sociologoj, kaj li fondis en Vaŝingtono Universitatan Centron por la Biologio de la Naturaj Sistemoj. Ekzemple, por elimini la ronĝulojn el Saint Louis, oni komence studis la Ekologion de la getto-ratoj.

Commoner havas sian propran vivorganizon, li diras : « Ĝi estas kiel la naturo kaj la Ekosistemoj : intrinseka kompleksecо ! »

La natura procezo estas regata de distingaj leĝoj pri vivo kaj ekvilibro. Por konservi la ekvilibron ĉiuj Ekosistemoj nepre bezonas 4 bazajn elementojn kiuj estas :

1) **Neorganikaj substancoj,** gasoj, mineraloj, kunmetitaĵoj.
2) **Produktantoj,** la plantoj, kiuj transformas la substancojn je nutraĵo.
3) **Konsumantoj,** la animaloj, kiuj konsumas la nutraĵon.
4) **Putrigantoj,** bakterioj kaj fungoj, kiuj aliformigas la mortintan protoplasmon en utiligeblan substancon por la produktantoj.

La nuraj ĉefaj produktantoj estas la verdaj plantoj, kiuj sole kapablas kapti la sunenergion kaj kombini ĝin kun elementoj el la aero, akvo kaj rokoj por formi vivantajn histojn. La vegetaĵoj nutras la animalojn kiuj, siavice, liveras siajn forĵetaĵojn kaj kadavrojn al la natura putriĝo.

Estas la efika natur-reuzado de la putriĝo kiu estigas produktivan grundon. Tamen la procezo estas tiel delikata ke ĝi postulas 500 jarojn por krei unu « inch'on » de bona grundo, t.e. apenaŭ 3 centimetroj.

Plie, du gravaj leĝoj de la vivo kaj ekvilibro regas la ĝeneralan procezon. Unu el ili estas la ADAPTADO ; ĉiu speco elektas precize « niĉon » en la EKOSISTEMO, kie ĝi trovas nutraĵon kaj ŝirmejon. Ĉe la animaloj la ritmo de la multiĝo estas pli rapida ol tiu de la morto. La ekvilibro estas konservata dank'al la rabobestoj.

Alia leĝo estas tiu de NECESO de DIVERSECO. Iu pli diversaj estas la specoj, des pli sekura estos la ekvilibro, ĉar la danĝero de regado de unu genro de animalo super la aliaj malpliiĝas. Same por la plantoj : la VARIECO estas la granda taktiko de la natursupervivo.

La homo atencis tiujn leĝojn, li endanĝerigis sin kaj la naturon. Kelkaj konkretaj ekzemploj montros la interrilatojn de Kaŭzo al Efekto. Antaŭe ni devas citi la nomon de C. Johnson, Usona Administranto pri la Protektado de la Konsumantoj kaj de la Sanitara Sekcio pri la Ĉirkaŭaĵo. Li ankaŭ estras branĉojn, kiuj zorgas pri la nutraĵo, la drogoj, la nacia aerpolucio kaj la Administracio de la Ĉirkaŭaĵo-Kontrolo.

Lastan printempon oni trovis, neatendite, kvanton de D.D.T. en la salmoj de la Lago Michigan, do C. Johnson klopodis estigi kontrolon de la kemiaj forĵetaĵoj en Usono

De 20 jaroj la Usona kaj la Kanadia industrioj forĵetadis milionojn da funtoj de toksa Hidrargo en la Grandajn Lagojn.

Nuntempe tio kaŭzas alarmon en ambaŭ landoj.

En la Lago Saint-Clair la elprenaĵoj montris ke la fiŝoj entenas 14 oble la maximuman kvanton da hidrargo tolereblan por la homa konsumado. Do, la aŭtoritatoj nepre malpermesis la fiŝkapton en tiu lago, kaj parte en la lago ERIE.

Ankaŭ 5 industriaj firmoj forĵetis cianidon en la lagon MICHIGAN, kiu estas fonto de trinkaĵo por milionoj da personoj.

La subita intereso pri hidrargo sekvas multajn mortigajn toksiĝojn kaj pli ol cent mortojn en Japanio, Irako, Gvatemalo, Pakistano kaj Nova Meksikio. La tokseco de hidrargo estas bone konata, eĉ en la literaturo ! En la mondfama libro « Alice's adventures in Wonderland » (Aventuroj de Alice en la lando de Mirindaĵoj) la bildo de Mad Hatter (freneza ĉapelisto) estis inspirita de la fakto, ke en la 19a jarcento la ĉapelfarantoj uzis hidrargon en la preparo de la felto. Tio damaĝis la cerbon kaj laŭlitere povis frenezigi ilin.

Konklude, la nekontrolita forĵetado de hidrargaj restaĵoj vere endanĝerigas la homan sanon.

Oficiala Kanadiano diris pri tio : « Ĉiuj pensis, pro tio ke hidrargo estas 13 1/2 foje pli peza ol akvo, ke ĝi falos rekte al la fundo de la Lago. Ĉiuj eraris ! »

Unu el la plej neatenditaj anekdotoj koncernas la hipopotamojn. Ie, en Sud-Afriko, post ne sufiĉe serioza studo, oni konkludis ke tiuj malbelaj bestoj estas tute ne interesaj por la lando. Konsekvence oni permesis libere ĉasi ilin. Estis malprudenta decido. Fakte kiam la pezaj animaloj ne plu iris al la rivero, kie ili sin regule banis, la fluo tute kvietiĝis kaj la algoj, la akvoplantoj invadis la fluejon. Post la bano la hipopotamoj elakviĝis marŝante unu post la alia ; la vojo sekvita estis ŝajne plugita de la piedegoj, formante sulkojn, kanaletojn, por la akvo. Kiam la bestoj malaperis, la bremsita fluo estigis iundojn ; la akvo-helikoj invadis la bordojn. Ĉar ili estas vehikloj de « shistomiasis », grava malsano kiu atakas la hepaton kaj la inteston, epidemioj aperis ĉe la indiĝenoj ! En la naturo ĉio valoras, eĉ la libera bano de la hipopotamo !

La vivo en la maro estas severe endanĝerigita pro la mazuto de la ŝipoj, kiu mortigas la marfaŭnon, la nepre necesan planktonon kaj la diversajn algojn. Ĉiuj forĵetaĵoj de la industrio finfine iras en la maron pere de kloakoj kaj de riveroj. Kion diri pri la akcidenta eksplodo sur platformo por la ekspluato de petrolo, kiu okazis lastan jaron 6 milojn el Santa Barbara, kies plaĝoj estis tute difektitaj fare de la nigra tajdo !

La polucio de la Rejno estas gravega. Pro tio oni diras ke Nederlando estas la kloako de Eŭropo.

Kion diri pri la Sejno en Parizo ? Nokte, ĝi ankoraŭ inspiras la poetojn sed sub la taglumo oni prefere ne rigardu ĝin de tro proksime.

La fame konata franca mar-biologo Alain Bombard diras ke « la maro povas toleri la homajn forĵetaĵojn » sed li aldonas « tiu procezo de purigado estas facile kaj serioze difektita per la enkonduko de kemiaj sub-produktaĵoj de la civilizacio ». Apud Marseille du grandaj aluminio-rafinejoj forĵetas al la maro 6.000 tunojn potage de ruĝa sedimento. Kvankam 80 % el ĝi atingas profundan maran tranĉeon la restaĵoj sterniĝas ie sur la marfundo. « La « problemo », laŭ Bombard, « estas ke tiuj forĵetaĵoj, kiuj ne estas toksaj, superŝutas kaj mortigas ĉiujn vivantajn estaĵojn. Plie, tio okazas en loko kie oni nepre bezonas **vivantan** akvon por purigi la elfluojn de la Marseille-kloakoj. »

Nun, en multaj landoj oni komprenas la gravajn kaj urĝajn problemojn de la homa ĉirkaŭaĵo, kaj oni pli malpli decidis batalon kontraŭ la polucion. Temas pri necesa agado de ĉiu el ni en sia propra sfero.

Precipaj Dokumentoj el la revuo TIME.

P. POTIN.

Majstro akvo-gustumisto

Kun fingreto levata kaj okulvitroj stivitaj sur la nazo por pli bone efektivigi la noblan geston, pri kiu li meditas, Norbert N'Doye, gustumisto, rigardadas sian glason. Poste, per preciza gesto de kompetentulo, li kirletas la likvaĵon, alproksimigas la glason al siaj naz-truoj, delikate ĝin flaras, kaj fine liaj lipoj elprenas etan guton da akvo, dum kelkaj sekundoj ĝin « kirlas » ĉe la palato kun apenaŭ perceptebla gargarbruo ; kaj poste li diskrete elkraĉas la travideblan likvaĵon. Fina sceno : S-ro N'Doye kontente ridetas antaŭ ol gluti grandan glason da fonto-akvo, celante « parfumi » sian delikatan palaton.

Ĉu tiu gustumisto, kiu efektivigas sian mision kun tiom da eleganteco, gustumis « Châteauneuf-du-Pape 1969 ? Brouilly 1956 ? aŭ Pouilly-Fruissé 1952 ? Tute ne ! Se li devus anonci la « fonton » li dirus « Sejno-akvo 1969 » !

Kvankam famekonata gustumisto, S-ro N'Doye ne estas ano de la vino-gustumistaro. Li gustumas nur niajn parizajn riverajn akvojn, deĵorante en Akvo-Servicoj en Pariza Prefektejo. Nobla tasko, ĉar dank'al S-ro N'Doye kaj liaj kolegoj (unu dekduon kontrolas la Parizo-akvojn) la ĉefurbanoj povas, tute trankvile, trinki la akvon el sia krano. Efektive, ne estas elfonta akvo, pura, freŝa, klara, kiu fluas ĉe niaj kuirejoj kaj banĉambroj en Parizo. El la 850.000 kubaj metroj da akvo, ĉiutage uzataj de la Parizanoj, preskaŭ la triono — tion oni devas konfesi — devenas de la grizaj akvoj de Sejno kaj Marno, post filtrado kaj steriligado en la uzinoj de Ivry kaj St-Maur.

Estas en la gustumadejo de Ivry-uzino, ke S-ro N'Doye praktikas, jam de 21 jaroj, la « ĉason » kontraŭ « malbonaj gustoj ». Li komencis la metion kiel helpanto ĉe la steriliga baseno ; kaj nur post multaj testoj pruvantaj la kvalitojn de lia palato, li estis baptita « Kavaliro » de akvo-gustumado.

Lia laborejo estas malgranda kahelata ĉambro, situanta sub la giganta kaj kolora maŝinejo ; ĝi estas mini-laboratorio : bokaloj taŭge vicigitaj, koloraj glasoj, lampo je ultraviolaj radioj, kuvo.

— « Jen mia « kelo » », kaj S-ro N'Doye direktas posesivan fingron al la gustumado-kuvo. En tiu grandega mariabano, tenata je temperaturo 30° troviĝas la diversaj akvoj, kiujn oni devas ĉiuhore gustumi. La « kelo » proponas kvar akvojn en diversaj etapoj de traktado.

— la enpuŝotan akvon, jam fin-traktitan kaj pretan je konsumado.
— la akvon fin-filtritan
— la akvon filtrotan
— kaj la malplej agrablan, la krudan akvon tian, kia ĝi elvenas rekte el Sejno.

Kiam oni demandas lin, ĉu li ne timas la mikrobojn, S-ro N'Doye indulge ridetas : « Kredu min, la kruda akvo ne estas tiel malbongusta, kiel oni opinias kaj ankaŭ ne tiel danĝera, ĉar ĝi estis steriligita de la ultraviolaj sunradioj. Kaj cetere, mi ne timas mikrobojn, mi estas vakcinita ».

Tamen, en tiun krudan akvon, en kiu oni povus facile imagi, ke naĝas tutaj kolonioj da baciloj kaj bakterioj, la gustumisto delasas, tuj antaŭ gustumado, kelkajn gutojn da hipoklorita akvo kaj por neniigi tiun ĉi guston li aldonas 3-4 gutojn da hiposulfita sodo. La akvoj antaŭfiltritaj, kaj filtritaj sed ankoraŭ ne tute pretaj por konsumado, estas sammaniere traktataj. Nur la prem-pumpota akvo, forpuŝota en kondukilojn, povas esti trinkata tia, kia ĝi nun estas.


Sed, gustumante la akvon, kion oni celas malkaŝi ? Tion klarigas S-ro N'Doye : « La Parizo-akvoj povas enteni diversajn saporojn ; la plej rimarkita estas tiu de ŝlimo. Sed estas ankoraŭ multaj aliaj : kemiaj produktaĵoj elĵetitaj de uzinoj ; mazuto-ondo eligita de barĝo en riveron k.t.p. ...

Kelkfoje tiu saporo estas nepre neakceptebla. Tion oni nomas « alarm-kazo », kiu, feliĉe, tre malofte okazas. Tuj mi avertas la laboratorion, kaj se niaj traserĉoj estas vanaj, ni haltigas la « uzinon » ĝis la « krizo » estas finita.

Ĉu la odoro helpas por taksi akvon ?

S-ro N'Doye ridetas : « Bona nazo estas tiel utila, kiel bona palato. Same kiel por kelkaj vinoj, sufiĉas flari la likvaĵon por detekti ĝiajn kvalitojn. Nur glaseto da akvo povas eligi odorojn plej diversajn : aroma, balzama, kemia, medicina aŭ farmacia, tera (tamen akceptebla), fekaĵa, mucida, ŝlima...

Ve ! jen nazo tiel malbone traktata, kiel tiu de « Cyrano ». Tamen ĝi estas plej utila por la gustumado ; ĝi estas, kiel diris ĝojulo, aŭ eble filozofo, « la antaŭgvardio, kiu evitas multajn malagrablaĵojn al la buŝo ».



S-ro N'Doye bone prizorgas sian buŝon. « Mi trinkas nek vinon, nek alkoholon, eĉ ekster miaj deĵor-horoj. Miaj raraj « ekstravagancoj » estas « koko kun vino » aŭ rumbabao.

Eĉ ĉe la komunio-festeno de mia last-naskito, mi estis la nura, kiu ne trinkis ĉampanon. Permesita al mi nur glaso da biero ».

« Ĉu akvo-gustumanto povas almenaŭ frande manĝi ? »

« Atenton ! respondas S-ro N'Doye. Unue mi ne fumas. Pri manĝo-plaĉoj ili estas malmultaj : mi ne rajtas manĝi spicaĵojn, almenaŭ dum miaj labor-horoj, nek porkaĵon, nek kolbason, nek kamemberton, nek ruĝ-vinon kaj precipe ne « ekzotikajn manĝaĵojn ».

El « Lectures pour Tous » (Nov. 1969.

Tradukita de S-ino O. Guillot.

Fabrikado de alumetoj en Francio

En Francio, fabrikado de alumetoj, kiel tiu de tabako, cigaroj, cigaredoj por fumantoj, estas submetita al financa kaj ekonomia kontrolo de la ŝtato.

La tiel nomita S.E.I.T.A. (Servo por Ekspluatado Industria de Tabako kaj Alumetoj) havas saman juran reĝimon, kiel tiu de la ĉefaj naciigitaj entreprenoj.

Por espluatado de la tabak-monopolo, la S.E.I. T.A. disponas 9 direkciojn en rilatoj kun la kulturado kaj rikoltado de la tabako mem, 20 transformantajn fabrikojn kaj kelkajn pliajn specialajn sekciojn.

Koncerne la alumetojn, la S.E.I.T.A. ekspluatas 3 grandajn uzinojn, el kiuj « Trelaze », ne tre malproksime de Gresillon, kaj alian malpli grandan, cetere baldaŭ malaperontan.

***

En Francio, nur poplo-lignon oni uzas por la fabrikado de la alumet-tigoj kaj de la skatoletoj. Tamen por tiuj-ĉi lastaj, pli kaj pli oni anstataŭigas lignon per kartono.

La poplo-trunkoj, alportitaj kaj altamasigitaj sur laborlokoj en la uzino mem, estas plurpecigitaj laŭ ŝtipoj 72 aŭ 65 centrimetrojn longaj. Dume, oni zorge fortiras ĉiujn partojn ne konvenajn, ekzemple tiujn kiuj montras lignotuberojn.

Tuj poste, la ligno-blokoj rulas al alia maŝino, kiu senŝeligas ilin, kaj selektado apartigas la plej bonkvalitajn por rezervi ilin al fabrikado de la skatoletoj.

Oni nomas tigoj la ligno-pecetojn, kiuj iĝos alumetoj. Por lbteni ilin, rabot-maŝinoj rapidege disvolvas la aksumantajn trunkopecojn en bendojn ne pli ol 4 metrojn longajn kun dikeco egala je tiu de la farotaj tigoj. Aŭtomate, tiuj rabotaĵoj iras sur rulantajn tablojn en staploj 100 plataĵojn ampleksaj. Ĉiu el ili prezentiĝas antaŭ gilotino, kiu hakas laŭ dikeco de unu tigo, dum flankaj iloj tranĉas la staplojn laŭ longeco de la farotaj tigoj. Tiuj tigoj disfalas sur rulantan tapiŝon, kiu enversas ilin en ujon. Tie ili restas 30 sekundojn banantaj en kemia solvo, cele al brulimuneco por ke bruligado de la tigo ne daŭru post estingo de la alumet-flamo. Ankaŭ diversaj alumet-specoj iras al alia banado por ricevi apartan koloradon.

Kiam la tigoj eliras el la hak-maŝinoj, ili entenas proksimume 60 % da akvo, al kiu aldoniĝas tiu de de la banado. Necesas do, ke oni sekigu ilin. Tiam, denove sur rulantaj metal-tapiŝoj, ili eniras kaj restas 30 minutojn en sekigejoj meze de varma ventoblovo antaŭ ol iri en kriblilojn por perdi ĉiujn rubsegaĵojn kaj ricevi poluradon. (Plej parte, la vaporo necesa al varmigado de la sekigiloj venas el kaldronegoj provizitaj de la grandkvantaj ligno-ruboj defalantaj ĉe la diversaj fabrik-stadioj, precipe dum distrunkigo, senŝeligado, kaj volv-rabotado).

Lasta selektado sur klinantaj movantaj tabloj kun truetoj eliminas la difektitajn tigoj. Nur la perfektaj, transportitaj de pneŭmatikaj maŝinoj iĝos veraj alumetoj. Kiamaniere ? La tigo ricevos « butonon », t. e. la flamiĝebla kapo aŭ miksaĵo konsistanta el klorato de potaso, gelatena gluaĵo, kolora elfrotaĵo. Tamen, la « butono », rekte metita sur la tigon forbrulus antaŭ ol flamigi la lignon mem. Unue necesas trempi la tigo-kapon en likvigitan parafinon, kiu ebligos transdonon de la flamo al la ligno. Ĉiuj ĉi sinsekvantaj operacioj estas plenumitaj de maŝinoj la plej grandaj el ĉiuj uzitaj en la alumet-industrio. Ĉefe, ili konsistas el senfinaj movantaj metalrubandoj traboritaj de multegaj truetoj, kies diametro estas iom malpli granda ol tiu de la tigoj. Tiuj-ĉi, kunportitaj de pneŭmatikaj transportiloj alvenas en rezervujon kaj poste sur tablojn kun foldoj el kiuj ili estas forpuŝitaj, kapon malsupren, kaj forte plantitaj en la truojn de la rulanta metalrubando, kiu kondukas ilin super la parafina bano, kaj alterne descendas kaj suprenleviĝas en kaj el la banado. Daŭrigante sian vojon, la rubando kondukas la tigojn super dua bano por kemia trempado laŭ sama procedo, kaj al diversaj etaĝoj de la maŝino, kie la alumetoj sekiĝos. Fine, la alumetoj estos forpuŝitaj el la alveoloj pere de pikiloj kaj ili falos sur transportantajn tapiŝojn, kiuj kondukos ilin en skatoletojn.

Tia moderna senhalta maŝino fabrikas proksimume 2 milionojn da alumetoj hore.

***

Fabrikado de la foldkesteto, konsistanta el 2 elementoj : la skatolo mem kaj la tirkesto, postulas, kiel jam dirite, plej bonkvalitajn trunketojn. Ili estas disvolvitaj en bendojn malpli dikajn, ol por fari alumet-tigojn. Plie, sur la tiucelaj rabot-maŝinoj, estas lancetoj kiuj, en konvenaj lokoj, duontranĉas la rabotaĵojn por faciligi la postan faldigon, kiam

aliaj lancetoj rekte trančas ilin laŭ longeco de la fabrikotaj kestetoj. Tiamaniere preparitaj, la lignaj platetoj iras al foldmašinoj en kiuj ili envolviĝas sur metala mandreno kaj ricevas ŝirmilon el glu-papero kaj definitivan formon, antaŭ ol iri en sekigejon, kie ili restadas proksimume 40 minutojn. Kiam ne ligno, sed kartono estas uzata tiam la mašinoj estas nutrataj per bobenoj el kartonbendoj, kies larĝeco egalas la longecon de la farotaj foldo-skatoletoj. Tiuj-ĉi, samkondiĉe, kiel la lignaj ricevas faldojn, eltrančaĵojn, glu-paperon sed la tempo por sekigado estas malpli longa.

Modernaj ĉenmašimoj produktas inter 10.000 kaj 11.000 skatoletojn hore.

La fabrikado de la tirkestoj varias de 5.000 ĝis 15.000 hore laŭ la modeloj. Tiujn-ĉi, nune, oni faras nur el kartono kaj plej ofte el unu sola karton-peco kaj glu-papero.

Por enskatoligado, la ordinaraj alumetoj venantaj el la sinsekvaj fabrikmašinoj plenigas tirkestojn lokitajn en alveoloj de rulanta ĉeno ĉe kies ekstremo troviĝas aparta aranĝo ebligante la enŝovigadon de la plenigitaj tirkestoj en la foldo-kestetojn kaj finan etiketigadon. Kiam temas pri pli luksaj alumetoj, la tel nomitaj « alumetoj por tabak-fumantoj », la du elementoj de la skatoleto estas unue kunigitaj kaj etiketitaj antaŭ ol iri mekanike al senfina ĉeno sur kies horizontala plano ili estas aŭtomate malfermitaj, plenigitaj kaj refermitaj.

Iu ajn estu la metodo, plenigitaj skatoletoj devas ankaŭ ricevi flankajn « gratenaĵojn » aŭ frotilon. Ĝi konsistas el dika likvaĵo, kemia miksaĵo, en kiu ĉefe eniras ruĝa fosforo, kun gluaĵo, erodaĵo, farbo. Post nova sekigado, la finpretaj skatoletoj iras al mašinoj, kiuj plej diverse enpakigas ilin laŭ konvenaj kvantoj kaj modeloj.

Ni precizu, ke nun en Francio ĉiuj alumetoj fabrikataj de S.E.I.T.A. estas alumetoj « sekurecaj », tio signifas, ke ili povas flamiĝi nur per frotado sur la specala frotilo de la skatolo mem. Tiu ekbruligado estas ege rapida dank'al la efiko de la klorato de potaso, korpo tre riĉa pri oksigeno, sur la ruĝa fosforo, korpo avidema je oksigeno. La kemia reakcio estas faciligita de la frot-agado.

Ni diru, ke krom skatoletoj, S.E.I.T.A. ankaŭ liveras belaspektajn kovertojn ilustritaj kaj aparte ŝatataj de la kolektantoj. Plie, tiu ŝtat-fako povas speciale fabriki apartajn mendojn celantajn, pere de gluitaj bildoj, al propagando de industriistoj, komercistoj, grupoj, k.t.p. ; en tiu okazo, tiuj-ĉi, nepre, estas devigataj ne vendi sed disdoni senpage tiajn alumet-kovertojn.

Aliparte, kontraŭe al tabako, kiun en Francio oni povas aĉeti nur en specialaj magazenoj, alumetojn oni trovas ĉe plej diversaj komercistoj. Sufiĉas ke ili estu leĝe inskribitaj kiel vendistoj, kaj ke ili konservu la vendo-prezon fiksitan de la koncerna ŝtat-instanco. El tiu prezo, la ŝtato eltiras procenton konsideratan kiel impoŝton ; reszo de la gajno iras al S.E.I.T.A. rolanta kiel industria kaj komerca firmo. Kompreneble, ankaŭ la vendistoj ricevas modestan profiton.

***

La alumet-fabriko de Trelaze etendiĝas sur 8 hektaroj kaj okupas preskaŭ 300 personojn, duonparte virojn, duonparte inojn. Surloke, la laboristaro disponas pri medicina servo, kantino, aĉet-kooperativo, biblioteko.

B. CHEVERRY.

Nova esperantista kampadejo apud Mediteraneo sur la vojo al Hispanujo

SKRIBU AL : LENTAIGNE, 3, avenue de la Gaillarde

34 - Montpellier (Francujo)

(kun respond-kupono)

RAKONTOJ

LA MEDIKAGO

Karotharulo kaj frato Felikso revenas de la posttagmeza diservo kaj rapidas hejmen, ĉar estas tempo por la manĝeto.

Frato Felikso havos pantranĉaĵon kun butero aŭ konfitaĵo kaj Karotharulo pantranĉaĵon kun nenio, ĉar li volis tro frue montri sin plenkreskulo kaj deklaris antaŭ atestantoj, ke li ne estas frandema. Li ŝatas la senpreparitajojn, kutime manĝas sian senbuteran panon afekteme kaj ankoraŭ ĉi-vespere marŝas pli rapide ol frato Felikso, por ke li kiel unua ricevu sian manĝon.

Iafoje, la senbutera pano ŝajnas malmola. Tiam Karotharulo sin jetas al ĝi, same kiel oni atakas malamikon, ĝin kaptas, dento-kaj kapobatas, dispecigas kaj disflugigas. Liaj gepatroj lin ĉirkaŭas kun scivola rigardo.

Lia struta stomako digestus ŝtonojn, malnovan verdigre makulitan moneron.

Entute, li tute ne montriĝas malfacile nutrebla.

Li premas la klinkon de la pordo. Ĝi estas fermita.

« Mi kredas, ke niaj gepatroj ne estas tie. Piedfrapu vi », li diras.

Blasfemante, frato Felikso rapidas al la peza najlogarnita pordo kaj ĝin longe resonigas. Poste, ambaŭ unuigante siajn fortojn, vane kontuzas al si la ŝultrojn.

Karotharulo

Ja vere, ili ne enestas.

Frato Felikso

Sed kie ili estas ?

Karotharulo

Oni ne povas ĉion scii. Ni sidiĝu.
La ŝtupoj de la ŝtuparo malvarmas sub iliaj sidvangoj kaj ili sentas nekutiman malsaton. Per oscedoj, pugnofrapoj al la brustokavo, ili esprimas ĝian sintrudan fortegon.

Frato Felikso

Ili ne kredu, ke mi ilin atendos !

Karotharulo

Tamen pli bonan rimedon ni ne havas.

Frato Felikso

Mi ne atendos ilin. Mi ne volas mortmalsati, nepre ne ! Mi volas tuj manĝi, ion ajn, herbon.

Karotharulo

Herbon ! estas bona ideo, tiel ni superruzos niajn gepatrojn.

Frato Felikso

Ĉu ne vere ? oni ja manĝas salaton. Inter ni dirite, medikago ekzemple, estas tiel mola kial salato. Ĝi estas salato sen oleo kaj vinagro.

Karotharulo

Oni ne bezonas miksi.

Frato Felikso

Mi vetas, ke medikagon manĝos mi kaj ne vi !

Karotharulo

Kial vi kaj ne mi ?

Frato Felikso

Tute serioze, ĉu vi volas veti ?

Karotharulo

Ĉu ni ne povus peti de la najbaroj po unu pantranĉaĵo kun kaezajo por ĝin prišmiri ?

Frato Felikso

Mi preferas medikagon.

Karotharulo

Ni foriru ! diras Karotharulo.

Baldaŭ la medikagokampo disvolvas antaŭ ilia rigardo sian apetitodonan verdaĵon. Tuj ĉe la eniro, ili ĝojas ŝovi la ŝuojn,, piedpremi la molajn tigojn, streki mallarĝajn vojojn, kiuj longe malkvietigos kaj igos diri :

— Kiu besto pasis ĉi tie ?

Tra iliaj pantalonoj, malvarmeto penetras ĝis la grade rigidiĝintaj tibikarnoj.

Ili haltas meze de la kampo kaj lasas sin fali sur la ventron.

— Estas komforte, diras frato Felikso.
Kun tiklo ĉe la vizaĝo, ili ridas, kiel iam, kiam ili kuŝis kune en la sama lito kaj kiam sinjoro Lepik kriis al ili el la apuda ĉambro :

— Ĉu vi fine dormos, knabaĉojn ?

Ili forgesas sian malsaton kaj eknaĝas mariste, hunde, rane. Nur ambaŭ kapoj elmergiĝas. Ili mantrancas, piedŝovas la verdajn, facile rompitajn ondetojn, kiuj mortintaj ne plu fermiĝas.

— Mi enprofundiĝas ĝis la mentono, diras frato Felikso.

— Rigardu, kiel mi antaŭeniras, diras Karotharulo.

Ili devas ripozi, pli kviete frandi sian feliĉon.

Kubutapoge, ili sekvas per la rigardo la ŝveliĝintajn galeriojn, kiujn fosis la talpoj kaj kiuj zigzagas tiel same ternivele, kiel same haŭtnivele la vejnoj de la maljunuloj. Jen ili forŝoviĝas el ilia vido, jen ili ŝprucas en maldensejo, kie la mordetanta kuskuto, malbona parazito, ĥolero de la bona medikago etendas sian barbon el flavruĝaj fibroj. En ĝi la talpomontetoj formas miniaturan vilaĝon el kabanetoj starigitaj laŭ la indiana modo.

— Tio ne plej gravas, diras frato Felikso, ni manĝu. Mi komencas. Atentu, ke vi ne tuŝu al mia porcio.

Per sia brako kiel radio, li figuras arkon.

— Sufiĉas al mi la cetero, diras Karotharulo.

Ambaŭ kapoj malaperas. Kiu havus supozon pri ilia ĉeesto tie ?

La vento blovas dolĉajn odorojn, returnas la maldikajn medikagofoliojn, elmontras iliajn palajn subaĵojn kaj tremetoj traskuas la tutan kampon.

Frato Felikso forŝiras plenbrakojn da furaĝo, per kio li ĉirkaŭvolvas sian kapon, ŝajnigas plensatigon, imitas la makzelan bruon de nesperta bovido, kiu sin ŝveligas. Kaj dum li ŝajnigas, ..., ke li formanĝas ĉion, eĉ la radikojn, ĉar li havas vivosperton, Karotharulo tute kredas lin kaj pli delikata elektas nur la belajn foliojn

Per sia nazopinto, li ilin kurbigas, venigas al sia buŝo kaj kviete maĉas. Kial rapidi ?

Ni ne luprenis la manĝotablon. Al festo ne urĝas iri.

Kaj grincigante la dentojn kun naŭzo kaj amara lango, li forglutas, sin regalas.

NUR SONĜIS LA HUNDO

Kubutapoge sub la lampo, sinjorino Lepik kaj fratino Ernesta legas unu la ĵurnalon, la alia sian premiolibron ; sinjorino Lepik trikas, frato Felikso rostetas siajn krurojn ĉe la forno kaj sur la planko, Karotharulo remaĉas rememorojn.

Subite Piramo kiu dormas sub la mato, eligas surdan grunton.

— Ts ! ordonas sinjoro Lepik.

Piramo pli laŭte gruntas.

— Stultulo ! — diras sinjorino Lepik.

Sed Piramo tiel abrupte bojas, ke ĉiu eksaltas. Sinjorino Lepik manpremas al si la bruston. Sinjoro Lepik kunpremante la dentojn, strabe rigardas al la hundo. Frato Felikso blasfemas kaj baldaŭ oni sin ne aŭdas plu.

— Silentu, hundaĉo ! silentu do, diablo !

Piramo ankoraŭ pli bojas. Sinjorino Lepik manfrapas ĝin. Sinjoro Lepik skurĝas ĝin per sia ĵurnalo, poste per piedo. Surventriĝante, mallevante la nazon pro timo de batado, hurlas Piramo ; oni povus diri, ke furioziĝante, batante la maton per sia buŝo, ĝi dispecigas sian voĉon.

La kolero sufokas la Lepikojn. Starante, ili furiozas kontraŭ kuŝinta hundo, kiu spitas ilin.

La vitroj knaretas, la fornotubo kaprovoĉas kaj fratino Ernesta eĉ bojetas.

Sed, sen ies ordono, Karotharulo iris por vidi, kio okazas. Eble malfruiĝinta vagulo pasas sur la strato kaj trankvile reiras hejmen, krom se li ŝtelcele transgrimpas la ĝardenan muron.

Tra la longa nigra koridoro, Karotharulo antaŭeniras etendante la brakojn al la pordo. Li trovas la riglilon kaj bruege tiras ĝin, sed ne malfermas la pordon.

Iam li sin riskis, eliris kaj fajfante, kantante, piedfrapante, li penis fortimigi la malamikon.

Hodiaŭ li ruzas.

Dum liaj gepatroj supozas, ke li kuraĝe esploras la angulojn kaj fidelgardiste ĉirkaŭiras la domon, li trompas ilin kaj algluite restas malantaŭ la pordo.

Iun tagon oni lin kaptos, sed de longe lia ruzo estas al li sukcesa. Li timas nur terni kaj tusi. Li retenas sian spirblovon kaj kiam li levas la okulojn, li ekvidas tra fenestreto, super la pordo, tri aŭ kvar stelojn, kies brileganta pureco lin glaciigas.

Sed estas nun tempo por rehejmeniri. La ludo ne devas daŭri tro longe. Vekiĝus la suspektoj.

Denove, per siaj nefortaj manoj, li skuas la pezan riglilon grincantan inter la rustiĝintaj krampoj kaj brue ŝovas ĝin profunden en la riglingo. Dank'al tiu bruego, oni ne pridubu ĉu li elsaviĝas kaj plenumis sian devon ! Tiklate ĉe la lumbo, li rapidas trankviligi sian familion.

Nu, kiel lastfoje, dum lia foresto Piramo silentiĝis, kvietiĝinte, la Lepikoj reiris al siaj nemoveblaj sidlokoj kaj kvankam oni ne pridemandas lin, tamen Karotharulo diras laŭkutime :

— Nur sonĝis la hundo.

El « Karotharulo » verkita de
Jules RENARD
tradukita de Jean Lenel.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

En la venonta numero aperos la listo de la gajnintoj, kiuj estos persone informitaj tuj post la fina juĝado fare de la konkurso-komisiono. Ankaŭ en nia venonta numero aperos la unuaj provoj de nova konkurso.

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvo de la problemoj aperintaj en la antaŭa numero.

La patrino de la simio : Kiam la patrino estas trioble pli aĝa ol la simio, liaj aĝoj estas respektive : 3x kaj x. Do la konstata diferenco estas 2x. Kiam la simio estos trioble pli aĝa ol la patrino estis, li estos 9x. Kiam la aĝo de la patrino estas la duono ĝi estas 4 1/2 x kaj tiu de la simio 2 1/2 x. Dufoje tiu aĝo, 5x, estas la aĝo de la patrino en la problemo kaj la simio estas 3x-jara.

$5x + 3x = 4.$

$x = 1/2$ kaj $5x = 2\ 1/2.$

Pezo de la simio = pezo de la pezilo = 40 uncoj.

Oni diras al ni, ke : 40 + pezo de la ŝnuro = 1 1/2 (40+40—40).

Pezo de la ŝnuro : 60—40 = 20 uncoj.

Longeco de la ŝnuro : 5 futoj.

La koloraj ovoj : Unu el la filoj ricevis du bluajn ovojn (10 f.) kvar ruĝajn (12 f.) kaj du flavajn (2 f.) ; la du aliaj filoj ricevis po tri bluaj ovoj (15 f.), du ruĝaj (6 f.) kaj tri flavaj (3 f.).

Enigmo : Unua solvo : 7-9-5-6-1-4-2-1-8-10-6-7-5-8. Dua solvo : 8-10-6-5-2-1-4-2-7-9-5-8-6-7.

NOVAJ PROBLEMOJ

Stranga multiplikado : Karlo Kapeto demandis al sia kara instruisto ĉu ne estus eble multipliki nombrojn sen granda streĉo de la menso. Karlo ne povis memori la multipliko-tabelon post la nombro 2. Ankaŭ per la nombro 2 li povis dividi sed ne plue. « Ĉu vi scipovas adicii? » demandis la instruisto ». Jes, perfekte. » — « Do vi faros jene : metu la du multiplikotajn nombrojn unu apud la alia. Multipliku per du la nombron sur la maldekstra flanko kaj dividu per du la nombron sur la dekstra flanko. Vi ripetos la samajn multiplikon kaj dividon ĝis la dekstra nombro fariĝos 1. Poste vi forstrekos ĉiujn nombroj sur la maldekstro, kies koresponda nombro sur la dekstro estas para. Vi adicios la nombrojn restantajn en la maldekstra kolumno.

Kaj nun, kara leganto, provu mem.

Ĉu vi konas tiujn florojn?

Ĉiu el la floroj prezentitaj sur tiu bildo kreskas en iu el la pejzaĝoj prezentitaj sur la subaj kaj supraj bildetoj. Trovu al kiu el tiuj pejzaĝoj apartenas ĉiu el la floroj.



GRAMATIKO PER BONHUMORO


« La volotivo (u-modo) esprimas agon konceptatan de iu (verbo de la unua propozicio) sed realigotan (eventuale) de iu alia. »



— Mi insistas, ke oni repagu al mi la vojaĝkoston.



— Mi jam petis, ke vi ne troigu vian humurinklinon.



— Mi jam malpermesis, ke vi ludu per la klientoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (60 zl.).

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 3-4 de 1970, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Peut-être croyez-vous que Grésillon dort à nouveau après le court réveil de Pâques ? que les week-ends voient de temps à autre les portes du château s'ouvrir pour accueillir des groupes amis, mais que dès le lundi tout s'engourdit pour attendre une nouvelle visite ? que passés les gros travaux de l'hiver plus rien ne change que la parure du parc ? Erreur. Des aménagements moins spectaculaires, mais non moins importants se poursuivent grâce à la présence presque constante de nos amis M. et Mme Ciret qui consacrent depuis plusieurs semaines la plus grande partie de leur temps à des travaux qui ajouteront au plaisir que vous éprouvez lorsque vous passez quelques jours ou quelques semaines à Grésillon. Grâce à leur travail patient, un mini-golf s'étend maintenant derrière le terrain de volley-ball. Que d'heures ont été consacrées, pénibles sans doute parfois, que d'ingéniosité a été dépensée pour économiser les deniers de la Maison. Le résultat est un parcours, qui demandera encore quelques aménagements, mais qui dès maintenant peut servir. Merci à nos amis Ciret pour cela, pour tout ce qu'ils font si discrètement mais avec compétence. Il est juste qu'hommage leur soit rendu.

Merci aussi à M. Métivier auquel nous devons la décoration florale de la propriété. M. Métivier est si attaché à la Maison, lui aussi, qu'il vient s'y reposer de son métier d'horticulteur... en plantant des fleurs et des arbustes ! C'est à lui que nous devons les parterres qui sont le plaisir des yeux.

La saison d'été s'annonce convenable. En juillet, le château sera encore cette année insuffisamment rempli quoiqu'un peu plus que l'an dernier. Août ne connaîtra peut-être pas le record de l'an dernier, mais il nous faut déjà jongler avec les numéros de chambres pour réussir à loger tous les inscrits au mieux et chaque jour arrivent de nouvelles demandes. De bons amis se sont annoncés que nous reverrons avec plaisir. De nouveaux venus aussi dont nous sommes sûrs qu'ils deviendront des amis.

Dans deux ans, en 1972, Grésillon ouvrira ses portes pour la 20e année. Nous désirons marquer cet anniversaire. Il nous faut y penser dès maintenant. Et, vous-même, pensez à ce que vous ferez dans deux ans.

P. BABIN.

NOS PEINES

Le dernier numéro de « Kulturaj Kajeroj » était sous presse lorsque nous avons appris le décès de Jean Lenel. Nous le savions malade, mais nous ne pensions pas à une issue aussi brutale. Il aimait se retrouver à Grésillon où il ne comptait que des amis. Malgré sa maladie, il participait aux activités du soir tant il aimait le théâtre. Excellent espérantiste, il se consacrait à des traductions dont certaines ont déjà paru dans notre revue.

A Madame Lenel, à Françoise, Jean-Michel et Dominique, nous adressons nos affectueuses condoléances.

PHILATELISTES

Nous avons toujours à votre disposition de magnifiques séries de Roumanie (timbres neufs) que nous vendons à 50 % du prix du catalogue Yvert. Ecrire à M. Giloteaux, 3, allée Béranger, 59 - Croix. C.C.P. Lille 2.269.89.

NOTRE REVUE

Le rythme des réabonnements s'est ralenti, ce qui se produit toujours à cette époque de l'année. Mais nous vous demandons de ne pas attendre la fin de l'année car l'afflux des abonnements pour l'année en cours et ceux pour l'année suivante est tel, qu'il ajoute à notre travail déjà grand. Nous rappelons que l'abonnement couvre l'année civile (1er janvier - 31 décembre). Les nouveaux abonnés des six premiers mois reçoivent les numéros déjà parus. A partir de juillet, les nouveaux abonnements comptent pour l'année à venir, mais reçoivent les deux derniers numéros de l'année en cours.

⁂

NOS ABONNES BIENFAITEURS

R. Slot (Pays-Bas)	15.00
E. Richard (44)	15,00
J.-P. Guillot (86)	15,00
R. Villégier (73)	15,00
R. Llorens (26)	15,00
H. Lavallée (76)	15,00
L. Marko (Hongrie)	15,00
O. Leduc (44)	15,00
A. Bois (35)	15,00
P. Gaudeau (13)	15,00
	150,00

PROFITEZ DE VOS VACANCES

pour lire de bons livres

Notre libro-servo est à votre disposition

DEMANDEZ NOTRE CATALOGUE

NOTRE PROGRAMME D'ÉTÉ

Première Période

Arrivée le 28 Juin — Départ le 12 Juillet

Stage pour Responsables de Cours ou de Groupes

(Il est souhaitable que les participants expriment leurs propres idées sur l'enseignement de l'Espéranto et qu'ils amènent quelques élèves avec eux).

Cours de degrés divers.

Rôle du théâtre dans les activités de groupe.

Deuxième Période

Arrivée le 12 Juillet — Départ le 26 Juillet

Vacances Internationales Culturelles et Espérantistes

THÉATRE

Confection de marionnettes, théâtre (Sro Perseke).
Conférences, art dramatique (M. Thierry).
Le 24 : Représentation théâtrale.

Troisième Période

Arrivée le 26 Juillet — Départ le 9 Août

Etudes Espérantistes

TROIS COURS — EXAMENS

Chaque jour : 9 h. - 12 h. : Cours.
17 h. 30 - 19 h. : Conversation.
21 heures : Distractions diverses.

Quatrième Période

Arrivée le 9 Août — Départ le 30 Août

Semaines Espérantistes et Culturelles

Cours pour débutants — Cours pratique — Cours supérieur.
Préparation aux différents examens.
Cours de reliure et de vannerie.

Chaque jour : 9 h. 30 - 12 h. : Cours.
14 h. - 16 h. : Reliure, vannerie, émaux.
18 h. - 19 h. : Conversation.
21 heures : Distractions diverses.

Excursions les 19 et 26 août.

EN SEPTEMBRE : Possibilité de séjour de repos.

Renseignements et adhésions :

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon - 49 - BAUGÉ

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :
POR LA PRAKTIKANTOJ
de **P. Babin**
Prix : **8,50 F.**

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,40 F.
couleur :	0,50 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.
Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera :	28,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.